

ROMANO PRI LA TRI REGNOJ

DE LUO GUANZHONG
ELĈINIGIS LAŬLUM

Tria volumo



ĈINA FREMDLINGVA ELDONEJO

ROMANO PRI LA TRI REGNOJ

DE LUO GUANZHONG
ELĈINIGIS LAŬLUM

En tri volumoj



Serio “Oriento-Okcidento”

n-ro 44

sub aŭspicioj de la Universala Esperanto-Asocio
en oficialaj rilatoj kun Unesko

ĈINA FREMDLINGVA ELDONEJO
BEIJING ĈINIO 2008

图书在版编目 (CIP) 数据

三国演义 (1-3) : 世界语 / (明) 罗贯中著; 李士俊译.

北京: 外文出版社, 2008

ISBN 978-7-119-05493-3

I. 三... II. ①罗... ②李...

III. 章回小说-中国-明代-世界语 IV. I242.4

中国版本图书馆CIP数据核字 (2008) 第111761号

责任编辑: 牛雪琴 孙艾

装帧设计: 扈旭东

总体统筹: 苏漪军

剪纸插图: 田承坤

三国演义

罗贯中 著

李士俊 译

©2008外文出版社

出版发行:

外文出版社

地址: 中国北京百万庄大街24号

邮政编码: 100037

网址: <http://www.flp.com.cn>

电话: 008610-68320579 (总编室)

008610-68995927 (编辑部)

制 版: 北京火天堂文化传播有限公司

印 制: 北京隆元普瑞彩色印刷有限公司

开 本: 889mm×1194mm 大1/32 印 张: 58

2008年第 1 版 第 1 次印刷

(世界语)

ISBN 978-7-119-05493-3

15000 (平装)

版权所有 侵权必究 有印装问题可随时调换

PRONONCA ŜLOSILO DE LA PROPRAJ NOMOJ EN LA ROMANO

La ĉinaj propraj nomoj latinigitaj laŭ la ĉina oficiala sistemo povas esti prononcataj kiel la Esperantaj kun jenaj esceptoj:

ch = ĉ h = ĥ j = ĝj q = ĉj r = ĵ sh = ŝ w = ŭ x = ŝ y = j
zh = ĝ ai = aj ei = ej ao = aŭ ou = oŭ ia = ja ian = jan ie = je
iao = jaŭ iou = joŭ uo = ŭo uai = ŭaj uei = uj uan = ŭan
uang, wang = ŭang weng = ung yu = ju ŭ kaj u post j, q, x = ju

ENHAVO

Okdekunua ĉapitro

Avida pri venĝo de la frato Zhang Fei estas murdita;

Por venĝi sian fraton la Imperiestro faras militiron.....1187

Okdekdua ĉapitro

Sun Quan kapitulacas al Wei, ricevas la naŭ dignojn;

La unua Imperiestro marŝas al Wu, premias la armeon.....1199

Okdektria ĉapitro

Batatlante ĉe Xiaoting la Imperiestro kaptas malamikon;

Defendante la riveron instruitulo nomumiĝas generalo.....1212

Okdekkvara ĉapitro

Lu Xun bruligas kampadejojn en sepcent lioj;

Kongming aranĝas okremparan labirinton.....1229

Okdekkvina ĉapitro

Imperiestro Liu al kronprinco testamentas;

Zhuge Liang aplombe rezistas kvin armeojn.....1244

Okdeksesa ĉapitro

Por subigi Zhang Wen, Qin Mi debatas genie;

Por venki Cao Pi, Xu Sheng atakas per fajro.....1259

Okdeksepa ĉapitro

Kongming militiras kontraŭ la sudaj agresantoj;

Meng Huo estas kaptita de la ĉiela armeo en batalo.....1274

Okdekoka ĉapitro

Shu-armeo transpasas Lu-Riveron, rekaptas Meng Huo;

Kongming travidas lian falson kaj lin kaptas triafoje.....1289

Okdeknaŭa ĉapitro	
La Lordo de Wuxiang kvarafoje faras sian planon;	
La reĝo de l' barbaroj sudaj kaptitas kvinafoje.....	1302
Naŭdeka ĉapitro	
Gigantaj bestoj estas aplikitaj en la sesa venko.....	1318
Kirasoj el rotangoj bruligitas por la sepa kapto	
Naŭdekunua ĉapitro	
La ĉefministro oferas al Lu-Rivero antaŭ sia reiro;	
Zhuge Liang petskribas por ataki l' Centran Landon.....	1336
Naŭdekdna ĉapitro	
Zhao Zilong mortigas kvin generalojn;	
Zhuge Liang artifike kaptas tri urbojn.....	1355
Naŭdektria ĉapitro	
Jiang Boyue submetiĝas al Zhuge Liang;	
Kongming murdas Wang Lang per insulto.....	1369
Naŭdekkvara ĉapitro	
Zhuge Liang venkas ĉjang-soldatojn en neĝado;	
Sima Yi kaptas Meng Da en la tago difinita.....	1384
Naŭdekkvina ĉapitro	
Pro malakcepto de konsilo Ma Su perdas Jieting;	
Per sia sepkordludo Kongming retirigas Zhongda.....	1399
Naŭdeksesa ĉapitro	
Verŝante larmojn Kongming senkapigas Ma Su;	
Tranĉinte harojn Zhou Fang trompas Cao Xiu.....	1415
Naŭdeksepa ĉapitro	
Refoje Kongming petas militiri kontraŭ Wei;	
Jiang Wei supervenkas Wei per falsa letero.....	1428

Naŭdekoka ĉapitro

Wang Shuang ekzekutita dum persekuto al Han-armeo;

Lordo de Wuxiang venkas en atako al Chencang.....1443

Naŭdeknaŭa ĉapitro

Zhuge Liang venkas super la armeo de Wei;

Sima Yi invadas la okcidentan regnon Shu.....1458

Centa ĉapitro

Han-armeo surprizatakas la kampadejon de Cao Zhen;

Sur batalfronto Kongming humiligas Sima Zhongda.....1474

Centunua ĉapitro

Zhuge Liang ŝajnigita dio transpasas Longshang;

Kurante al Jiange Zhang He trafas ruzaranĝon.....1489

Centdua ĉapitro

Sima Yi okupas la nordan ponton de Wei-Rivero;

Zhuge Liang kreas lignajn bovojn kaj ĉevalojn.....1505

Centtria ĉapitro

Sima Yi estas ĉirkaŭata ĉe la gorĝo Shangfang;

Ĉe Wuzhangyuan Zhuge preĝas por sortoŝanĝo.....1523

Centkvara ĉapitro

La stelego falas – la ĉefministro de Han ĉielen reiras;

Ligna statuo de Kongming teruras la marŝalon de Wei.....1539

Centkvina ĉapitro

Antaŭe Kongming kaŝis planon en brokata saketo;

Cao Rui formovas la teleron por kolekto de roso.....1551

Centsesa ĉapitro

Post la malvenko mortas Gongsun Yuan ĉe Xiangping;

Ŝajnigante malsaniĝon Sima Yi trompas Cao Shuang.....1567

Centsepa ĉapitro	
La regpotenc' de Wei transiras al la Sima-Domo:	
Batalon perdas Jiang Wei ĉe la Bovokapa Monto.....	1582
Centoka ĉapitro	
Ding Feng en neĝo aplikas mallongan glavon;	
Sun Jun ĉe festeno ellaboras sekretan planon.....	1598
Centnaŭa ĉapitro	
Per ruzo generalo de Han enfaligas Sima Zhao;	
Cao Fang detroniĝas kaj puniĝas la Wei-Domo.....	1611
Centdeka ĉapitro	
Rajdante sola Wen Yang pelas for potencan trupon;	
Kun dorso al rivero Jiang Wei venkas malamikon.....	1624
Centdekunua ĉapitro	
Per sia saĝo Deng Ai venkas super Jiang Wei;	
Zhuge Dan juste punbatalas kontraŭ Sima Zhao.....	1637
Centdekdua ĉapitro	
Yu Quan oferas sian vivon por savi Shouchun;	
Jiang Wei batalas furioze por kapti Changcheng.....	1649
Centdektria ĉapitro	
Ding Feng aranĝas planon por mortigi Sun Chen;	
Jiang Wei batalon faras kaj supervenkas Deng Ai.....	1661
Centdekkvara ĉapitro	
Murdatas Cao Mao en la ĉaro ĉe l' suda pordego;	
Jiang Wei oferas grenon por venki la Wei-Armeon.....	1674
Centdekkvina ĉapitro	
Kredante l' kalumnion Liu Shan revokas l' armeon;	
Per terkultur' armea Jiang Wei eskapas katastrofon.....	1686

Centdeksesa ĉapitro
 Zhong Hui dividas la armeon por eniri Hanzhong;
 Aperas la spirito de Kongming ĉe Dingjun-Monto.....1698

Centdeksepa ĉapitro
 Deng Shizai sekrete glitas tra l' pasejo Jinping;
 Zhuge Zhan bataladas ĝis la morto ĉe Mianzhu.....1710

Centdekoka ĉapitro
 Plorante ĉe l' prapatra templo unu princo mortas;
 Du generaloj ekkonkuras pri la glor' pro Xichuan.....1724

Centdeknaŭa ĉapitro
 La falsa kapitulaco pruviĝas malsukcesa;
 L' imperiestra abdiko kopias la ekzemplon.....1736

Centdudeka ĉapitro
 La veterana general' prezentas novan planon;
 Per kapitulac' de Sun Hao la Tri Regnoj unuiĝas.....1752

OKDEKUNUA ĈAPITRO

AVIDA PRI VENĜO DE LA FRATO ZHANG FEI ESTAS MURDITA; POR VENĜI SIAN FRATON LA IMPERIESTRO FARAS MILITIRON

La imperiestro deziris militiri al la Orienta Wu, sed Zhao Yun konsilis: “Cao Cao estas perfidulo, sed ne Sun Quan. Nun Cao Pi uzurpis la tronon kaj kolerigis kaj la diojn kaj la homojn. Via Majesto povas unue preni la regionon interne de la pasejo¹⁹⁹ kiel vian cellokon por la militiro, starigi vian armeon en la supra baseno de Weihe-Rivero por punataki la perfidulojn, kaj tiam la lojaluloj de Han oriente de la pasejo certe bonvenigos la imperiestran armeon kun siaj greno kaj ĉevaloj. Se vi atakos Wu anstataŭ Wei, se via armeo engaĝiĝos, ĝi ne povos esti revokita. Via Majesto bone konsideru tion.”

“Sun Quan murdis mian pli junan fraton kaj ankaŭ pro aliaj, Fu Shiren, Mi Fang, Pan Zhang kaj Ma Zhong, pliigis mia dentgrinciga malamo; mia rankoro povus solviĝi nur per manĝo de lia karno kaj ekstermo de liaj samklananoj! Kial vi baras al mi la vojon?”

“Milito kontraŭ Cao celas venĝi la publikon,” diris Zhao Yun, “dum venĝi fraton estas privata afero. Mi petas, ke vi traktu la imperian problemon kiel pli gravan.”

“Se mi ne povus venĝi la fraton,” diris la Imperiestro, “eĉ dekmillia vasta teritorio de la imperio neniom valorus por mi.” Li ne akceptis la konsilon de Zhao Yun kaj ordonis sian armeon militiri kaj krome sendis kurieron al Wuxi por pruntepreni kvindek

¹⁹⁹ La regiono interne de la pasejo – regiono okcidente de Hangu-Pasejo.

mil soldatojn por kune agadi; samtempe li sendis homon al Langzhong por promocii Zhang Fei kiel Generalon de Ĉaroj kaj Kavalerio, Komandanton de la Ĉefurbaj Distriktoj, Lordon de Xixiang kaj Provincestron de Langzhong. La sendito foriris kun la dekreto.

Informiĝinte pri la murdo far la Orienta Wu al Lordo Guan, Zhang Fei ploregis tage kaj nokte kaj sangmakulis siajn vestojn. La generaloj klopodis lin konsoli per vino, sed post ebriiĝo lia kolero ankoraŭ pli grandiĝis. Se iu en aŭ ekster lia tendo kulpis, li tuj lin skurĝadis kaj pluraj mortis de tio. Ĉiutage li grincigis siajn dentojn rigardante al la sudo pro malamego, kaj li lamentadis senĉese. Subite oni raportis, ke alvenas sendito, kaj li haste lin invitis en la tendon. Li malfermis kaj legis la dekreton. Li akceptis la asignitajn titolojn, danke riverencis al la nordo, kaj regalis la senditon per vino.

“Mia pli aĝa frato estas murdita,” diris Zhang Fei, “kaj mia rankoro profundas kiel la maro. Kial la korteganoj ne apelacias al la Imperiestro por militiro?”

La sendito diris: “Multaj konsilis, ke Lia Majesto unue ekstermu Wei kaj poste ataku Wu.”

Zhang Fei koleris kaj diris: “Kiaj vortoj! Kiam ni fratiĝis en la persika ĝardeno, ni ĵuris kune vivi kaj morti. Malfeliĉe nun mia dua frato forpasis, kiel ni ankoraŭ povas ĝui riĉan kaj gloran vivon! Mi persone vizitos la Imperiestron kaj volonte komandos la avanon por atakos Wu dum la funebrado. Mi kaptos la perfidulon viva, por venĝi mian duan fraton kaj plenumi nian promeson!” Tion dirinte, li venis kune kun la sendito al Chengdu.

La Imperiestro ĉiutage persone iris al la ekzerca placo por trejni la armeon por ekmilitiri en difinita tago kaj persone ĝin gvidi. Korteganoj iris en la rezidejon de la ĉefministro por interkonsiliĝo kaj diris: “Ĵus surtroniĝinte, hodiaŭ la Ĉiela Filo deziras persone gvidi militiron. Tio ĉi ne signifas, ke li alte taksas la regadon de la imperio. Via Ĉefministra Ekscelenco respondecas pri ekvilibro de la ŝtataj aferoj. Kial vi ne lin admonas?”

“Mi lin konsilis foj-refoje,” diris Kongming, “sed li ne

急難飛害
兄張遇



aŭskultis min. Hodiaŭ, ĉiuj Viaj Moŝtoj iru kune kun mi al la ekzerca placo por lin admoni.” Kaj Kongming kondukis la oficistojn al la Imperiestro kaj diris al li: “Hodiaŭ Via Majesto ĵus surtroniĝis. Se vi deziras militiri por puni la perfidulojn de Han kaj prosperigi la lojalecon en la imperio, vi povas persone konduki la ses armeojn por tio. Se vi celas nur militiri kontraŭ Wu por ĝin puni, sufiĉus ke vi sendu iun el viaj ĉefkomandantoj por tio. Kial Via Majesto persone penu por tio?”

Pro la insista deadmono, la Imperiestro iom ŝanceliĝis en la decido. Subite oni raportis, ke Zhang Fei alvenas, kaj la Imperiestro lin envenigis. Zhang Fei venis en la halon ĉe la ekzerca placo, kotoŭis tuŝante la teron per sia frunto kaj ekploris ĉirkaŭbrakante la piedojn de la Imperiestro. Ankaŭ Lia Majesto ekploris.

“Hodiaŭ Via Majesto fariĝis imperiestro,” diris Zhang Fei, “kaj jam forgesis niajn ĵurojn en la persika ĝardeno! Kial vi ne venĝas la duan fraton?”

La Imperiestro diris: “Multaj oficistoj min deadmonis, tial mi ne kuraĝis ekagi senpripense.”

“Kiel la aliaj povus scii niajn ĵurojn en la pasinteco?” diris Zhang Fei. “Se Via Majesto ne iros, mi oferos mian vivon por lin venĝi! Se mi ne sukcesus, mi preferus morti ol revidi Vian Majeston!”

“Mi iru kune kun vi,” diris la Imperiestro. “Vi konduku vian trupon el Langzhong, kaj mi kondukos trejnitaĵn soldatojn por kuniĝi kun vi ĉe Jiangzhou, kaj ni kune ataku la Orientan Wu por likvidi nian rankoron!”

Ĉe la foriro de Zhang Fei, la Imperiestro diris: “Mi ĉiam scias, ke vi furioziĝas post ebriiĝo kaj vipas viajn bravulojn kaj poste ordonas ilin plue funkcii ĉe vi. Tio ĉi estas vojo por gvidi vin al katastrofo. Ekde nun, estu tolerema, ne agu kiel antaŭe.”

Zhang Fei riverencis al li kaj lin adiaŭis.

En la sekventa tago, la Imperiestro deziris ekmarŝi kondukante la ordigitan armeon. Akademiano Qin Mi lin konsilis: “Via Majesto endanĝerigas la imperiestran korpon nur por bagatela honoro, kio estas konduto neaprobebla por antikvuloj. Mi petas, ke Via Majesto

konsideru.”

“Yunchang kaj mi estas kvazaŭ unupersono,” diris la Imperiestro. “Kiu povus forgesi la honestan promeson?”

Qin Mi staris surgenue kaj diris: “Se Via Majesto ne obeas mian konsilon, mi timas, ke okazos mispaŝo al via aktivado.”

La Imperiestro koleregis kaj diris: “Mi deziras fari militiron, kial vi diras tian malbonaŭguraĵon!” Li kriis al la gardistoj, ke ili elportu Qin Mi por senkapigo.

Qin Mi sen ŝanĝiĝo de la mieno, retrorigardis al la Imperiestro kaj diris kun rideto: “Mi ne bedaŭras mian vivon! Sed domaĝe la nova establaĵo renversiĝos!”

Ĉiuj petis pardonon por Qin Mi. La Imperiestro diris: “Lin enprizonigu portempe, ke mi traktu la aferon post mia reveno post venĝo.”

Informiĝinte pri tio, Kongming tuj prezentis petskribon al la Imperiestro por savi Qin Mi, kiu legiĝas jene:

Mi kaj aliaj korteganoj profunde kredas, ke la ruzaj artifikoj de la friponoj de Wu kaŭzis la falon de Jingzhou. Ni perdis nian ĉefgeneralon kaj nia ĉiela kolono rompiĝis en Chu-Regno. Tio vere estas domaĝo neforgesebla por ni. Tamen ni devas memori, ke estis Cao Cao, kiu krimis en faligo de la regado de Han kaj tiu, kiu ŝanĝis la dinastion de la Domo de Liu, ne estis Sun Quan. Mi kredas, ke se la perfidulo Cao malvenkos, tiam Wu nature submetiĝos al ni. Mi petas, ke Via Majesto akceptu la oran konsilon de Qin Mi, akumulu energion de la armeo por agadi en oportuna strategia, kio alportos al ni grandan fortunon al nia regado kaj al nia imperio!

Leginte la petskribon, la Imperiestro ĵetis ĝin sur la plankon kaj diris: “Decidon mi jam faris; ne plu oponu al tio!” Sekve li ordonis, ke la Ĉefministro Zhuge Liang helpu la kronprincon en gardado de Dongchuan kaj Xichuan; Flugkavaleria Generalo Ma Chao kaj lia kuzo Ma Dai helpu Generalon por Pacigo de la Nordo;

Wei Yan, en gardado de Hanzhong kontraŭ atako de la armeo de Wei; Tigra Generalo Zhao Yun kunagu interne kaj eskortu la proviantan trupon de greno kaj furaĝo; Huang Quan kaj Cheng Ji estu armeaj konsilantoj; Ma Liang kaj Chen Zhen respondecu pri dokumentoj; Huang Zhong komandu la avanon; Feng Xi kaj Zhang Nan estu vickomandantoj; Fu Tong kaj Zhang Yi estu leŭtenantaj komandantoj; Zhao Rong kaj Liao Chun estu gvidantoj de la ariero. Centoj da generaloj el Chuandong kaj Chuanxi, kaj aldone al ili ankaŭ generaloj mjaŭaj kaj jaŭaj el Wuxi-regiono, kun sepcent kvindek mil soldatoj, decidis ekmarŝi en la tago Bing-Yin (la kvindekunua de la ciklo) de la sepa monato en la unua jaro de la regperiodo Zhangwu.

*

*

*

Reveninte al Langzhong, Zhang Fei ordonis, ke la armeo pretigu blankajn flagojn kaj blankajn kirasojn en tri tagoj por fari militiron en funebraj kostumoj²⁰⁰. En la sekventa tago, subgeneraloj Fan Jiang kaj Zhang Da venis en lian tendon kaj diris: “Estas neeble tiel rapide pretigi blankajn flagojn kaj kirasojn. Ni petas iom prokrasti.”

Zhang Fei koleregis kaj diris: “Mi deziras tuj venĝi kaj jam en la venonta tago ni jam povu eniri la teritorion de la malamiko. Kiel vi kuraĝas malobei mian ordonon!” Li ordonis ŝnurligi ilin al arbotrunkoj kaj skurĝi ilin po kvindek frapojn je iliaj dorsoj. Post la skurĝado, li kriis montrante ilin per sia fingro: “Pretigu ĉion en la venonta tago! Alie mi dehakos viajn kapojn por ekspono al la publiko!” Ili eĉ sputis sangon pro la torturo.

Reveninte en la kampadejon, Fan Jiang diris: “Hodiaŭ ni estas torturitaj, kiel ni povos ĉion pretigi? Tiu homo furiozas kiel fajro. Se ni ne povos plenumi la ordonon, ni estos mortigitaj!”

Zhang Da diris: “Prefere mi mortigu lin ol lasi lin mortigi min.”

Fan Jiang diris: “Sed ni ne povas proksimiĝi al li.”

“Se ni ne devos morti,” diris Zhang Da, “do li kuŝos ebria sur

²⁰⁰ Blanko estas la funebra koloro por la ĉinoj.

la lito; se ni devos morti, do li ne ebriiĝos.”

Ili faris decidon post interkonsiliĝo.

En la tendo, Zhang Fei estis anksia kaj maltrankvila kaj li demandis siajn komandantojn: “Kial mia koro palpitacias, miaj muskoloj konvulsias kaj mi ne povas sidi trankvile, pro kio do?”

La generaloj respondis: “Pro via sopiro al Lordo Guan, tio okazas al vi.”

Zhang Fei ordonis, ke oni alportu vinon kaj ekdrinkis kun ili. Li ebriiĝis pretervole kaj kuŝiĝis en la tendo. Informiĝinte pri tio, Fan Jiang kaj Zhang Da kun kaŝitaj ponardoj enŝteliĝis en la tendon je la unua nokta horparo, mensogante, ke ili volas raporti al Zhang Fei sekreton, kaj iris rekte al lia lito. Zhang Fei kutime dormis kun nefermitaj okuloj. Tiunokte, li kuŝis en la tendo. Vidinte, ke liaj okuloj estas apertaj, la du friponoj ne kuraĝis lin tuŝi. Sed aŭdinte lian tondran ronkadon, ili kuraĝe paŝis antaŭen kaj per la ponardoj pikis en la ventron de Zhang Fei, kaj tiu ĉi mortis post kriego, en sia kvindekkvina jaro. Poste iu verkis jenan poemon pri tio:

*Ĉe Anxi l' inspektoron li skurĝadis en kolero,
Kun Liu ekstermis la flavkaptukulojn en ribelo.
Ĉe la Pasejo Hulao lia voĉo aerskuis,
Pro lia kri' ĉe Changban retrofluis la rivero.*

*Liberigita Yan Yan helpis lin en Shu-konkero,
Por kapti Hanzhong, venkis Zhang He dank' al ruz-supero.
Antaŭ ol militiri kontraŭ Wu li jam forpasis,
Senfina trist' plenigis Langzhong en l' aŭtun-aero.*

La du perfiduloj detranĉis la kapon de Zhang Fei kaj iris tiunokte kun dekoj da soldatoj al la Orienta Wu. En la sekvanta tago, la armeo informiĝis pri la okazaĵo, sed ne povis ilin kapti.

Tiutempe, generalo Wu Ban de Zhang Fei, veninta el Jingzhou, estis nomumita kiel vickomandanto por asisti Zhang Fei en gardado de Langzhong. Li unue sendis raporton al la Imperiestro pri la okazaĵo, poste li diris al Zhang Bao, la unua filo

de Zhang Fei, ke li enĉerkigu la patron, kaj ordonis lian pli junan fraton Zhang Shao gardi Langzhong. Zhang Bao persone iris al la Imperiestro por fari raporton pri la okazaĵo. Tiam la Imperiestro jam difinis la daton por ekmilitiri. La oficistoj sub la gvido de Kongming akompanis lin dek liojn for de la urbo, kaj poste revenis.

Reveninte al Chengdu, Kongming sentis malgajon kaj diris rigardante la oficistojn: “Se Fa Zheng restus viva, li povus haltigi la Imperiestron kaj preventi la orienten-militiron.”

*

*

*

Tiunokte, la Imperiestro sentis palpitacion kaj konvulsion de muskoloj kaj ne povis kuŝi trankvile. Li paŝis el la tendo kaj observis la stelojn en la ĉielo. Li rimarkis, ke unu aerolito kun grandeco de dekalitra mezurilo subite falis teren. Tio faris lin suspektema kaj sendis kurieron al Kongming en tiu nokto por peti klarigon. Kongming diris: “Tio aŭguras, ke perdiĝos ĉefgeneralulo kaj en tri tagoj certe estos surpriza raporto.” Sekve la Imperiestro haltigis la armeon en marŝado. Subite lia akompananto raportis: “Wu Ban, subgeneralulo de la Generalo de Ĉaroj kaj Kavalerio Zhang, alsendis leteron.”

La Imperiestro stamfis kaj diris: “Ho ve! Pereis mia tria frato!” Li legis la leteron kaj vere oni raportis al li pri la murdo de Zhang Fei. La Imperiestro ekploregis laŭte kaj falis teren svenante. La oficistoj lin rekonsciigis. En la sekvanta tago, oni raportis, ke trupo alrapidas kiel vento. La Imperiestro iris el la kampadejo por pririgardi. Post longa momento, li vidis ke juna generalo en blanka robo kaj arĝenta kiraso deĉevaliĝis kaj kotoŭis al li plorante. Tiu estis Zhang Bao.

“Fan Jiang kaj Zhang Da murdis mian patron,” diris Zhang Bao, “kaj ili iris al la Orienta Wu kun lia kapo!”

La Imperiestro ege ĉagreniĝis kaj tute perdis la apetiton. Ĉiuj oficistoj lin konsolis: “Kiel Via Majesto povas malzorgi vian sanon, se vi deziras venĝi la du pli junajn fratojn?”

Nur poste la Imperiestro ekmanĝis kaj li diris al Zhang Bao: “Ĉu vi kaj Wu Ban kuraĝas komandi vian trupon kiel avanon por